

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 3

Julio/Aŭgusto/Septembro 1984



36a IFEF-Kongreso en Slanĉev Brjag/Bulgario 12a ĝis 18a de Majo 1984



foto: Ritterspach

La Kongreso finiĝis, la venonta estas en preparo. LKK-prezidanto Marinov transdonis IFEF-flagon al la estonta LKK-prezidanto Henning Hauge.

Kiam najtingaloj kantis

Impresoj pri neordinara IFEF-kongreso en Bulgario

Tre fortan impreson postlasis la 36a Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), kiu okazis sub la alta protekto de la bulgara trafikministro inter la 12a kaj 18a de Majo 1984 en Slânĉev brjag (Suna Bordo). Kun pli ol 860 partoprenintoj el 23 landoj tiu evento apartenas al la kulmino en la 75jara historio de IFEF.

La membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) estas reprezentitaj bedaŭrinde ne en la kutima multnombrecu. Eble la hejme restintoj timis la distancon aŭ la kostojn. Sed tiuj, kiuj ĉeestis tie, povis plene ĝui la esperantistan sferon. La plej multaj germanoj kaj kelkaj eksterlandanoj akceptis la favorprezan inkluzivan vojaĝon per aviadilo, kelkaj kuraĝuloj eluzis la fervojon, sur la bulgara reto eĉ per senkosta tutlanda bileto, ne timante eventualajn malfacilaĵojn. Bonŝance la disponita hotelo situis proksime al la kongresejo, restoracioj, butikoj kaj maro. Kuŝi tie, sur blanka sablo sub varma suno, estis unu el la raraj plezuroj, se la ofte ŝanĝiĝanta vetero permesis ĝin. Sed ne malpli ĝojigis la dolĉa kantado de najtingaloj dum la vesperaj horoj.

Grandioza inaŭguro

Dimanĉon matene la solena malfermo disvolviĝis en la kongresejo, runde konstruita varietea teatro. Sur la podio trovis lokon krom la kompleta IFEF-estraro multaj eminentuloj. Post la himno impresige kantita de unuece vestita mikstata ĥoro, LKK-estro Marinov salutis la kongresanojn kaj prezentis la unuopajn personojn. Per koregaj frazoj s-ro Canov, la ministro de transporto kaj alta protektanto de la kongreso, bonvenigis la ĉeestantojn. Li memorigis pri la 20a IFEF-kongreso 1968 en Bulgario kaj rekomendis utiligi Esperanton ankaŭ por la interŝanĝo de profesiaj spertoj. La kongreson salutis ankaŭ aliaj gravaj personoj, ekz. la ĝeneral-direktoro de la Bulgaraj Ŝtatafervojoj (BDŽ), la prezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio (BEA), la reprezentanto de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Internacia Federacio de la Kultur-flegantaj Fervojistoj (FISAIC), pri kio la Internacia Fervojisto detale raportas. Sekvis la salutojn kaj bondezirojn de la landaj delegit(in)oj — emocia sceno kaj demonstro de la tutmonda internacia lingvo.

Joaĥim Giessner, la intertempe 70jaraĝa, sed ĉiam vigla IFEF-prezidanto, interligis sian profundan dankon al la LKK kaj la trafikministro kun la averto pri la multflanke minacata terglobo. Akcentinte la gravecon kaj valoron de la Internacia Lingvo li deklaris malfermita la kongreson.

Menciinda estas la jam tradicia parado de la multkolora uniformitaj gefervojistoj — simbolo de internacia amikeco de nia kolegaro —. Kun intereso oni rigardis en la kongresejo modele instalitan ekspozicion pri la evoluo de la bulgara popolo kaj pri la tiea fervoja historio. Giĉetoj por la vendado de libroj, esperantaĵoj kaj poŝtmarkoj estis forte frekventataj.

Faka laboro

En diversaj kunsidoj la specialistoj okupiĝis pri multflankaj laboroj, kiuj celas la utiligadon de Esperanto por fakaj celoj, ekz. per verkado de konvenaj artikoloj en la landaj organoj kaj en la Internacia Fervojisto. La terminara laboro atingis certan finon, sed la atendota nova leksikono de la Internacia Unio de la Fervojoj (UIC) necesigos denove prilaboradon, kaj nur poste eblos esperantlingva suplemento al tiu noveladono. Temo de la altkvalita fakprelego disdonita poste kiel lukse presita broŝuro estis „Stato kaj perspektivo de disvolvado de la fervoja transporto en P. R. Bulgario“. Ĝin verkis kolego Sinigerov kaj laŭtlegis kolego Dolapĉiev. Ne malpli interesaj estis la koncizaj informoj, kiujn donis deko da kolegoj pri fervojaj novaĵoj en sia lando, ripetinda plibonigo de la faka laboro per Esperanto. La intenco de la LKK prezenti esperantigitan sonfilmon de la Bulgaraj Ŝtatafervojoj bedaŭrinde renkontis teknikajn malfacilaĵojn. Je tiu okazo estu laŭdataj la malmultaj gekolegoj, kiuj konstante certigas la altan kvaliton kaj nivelon de la fervojfaka laboro.

Organizaj aferoj de IFEF

Tri kunsidoj okazis, unu nepublika, dum

kiu oni devis enŝlosi sin por reteni la scivolemulojn, kaj du plenkunsidoj, kiuj suferis pro mankaj aŭskultantoj. La sperta IFEF-prezidanto traktis kun la komitato koncize ĉiujn temojn de la abunda tagordo, pri kio la Internacia Fervojisto detale raportas. Tamen estu menciata kelkio. La ĝisnuna IFEF-estraro estas reelektita por pluaj du jaroj. La historia komisiono finis sian laboron post naŭ jaroj kaj povas senpage transdoni al ĉiu membro de IFEF presitan historion de IFEF. La IFEF-kotizo restos sen ŝanĝo en 1985. Vejle en Danlando estas la gastigonta urbo de la 37a IFEF-kongreso (17. — 23. 5. 1985). Jugoslavio sekvas en 1986, Pollando en 1987.

Arta vespero

Tiu aranĝo meritas apartan laŭdon. La organizantoj sukcesis kunordigi muzikajn, dancajn kaj recitajn kontribuojn el diversaj epokoj kaj landoj. La artistoj mem, grandparte profesiaj, demonstris kun verve kaj talento sian kapablecon, ĉu temis pri poemoj aŭ dialogoj, ĉu pri moderna dancado de junulara grupo, pri duetoj el konataj operoj aŭ tipe bulgaraj popolkantoj. La aŭskultantoj ne ŝparis pri la merita aplaŭdo. Presita programo estus faciliginta la ĝuon.

Folkloro vespero

Ĝi komenciĝis per kelkaj kantoj prezentitaj de miksitaj ĥoro. Ne mirinde ke ĝi estas distingita jam plurfoje per medaloj kaj ordenoj. La tradukoj el la nacilingvaj kantoj estis senmankaj, la voĉoj klaraj kaj vokalaj. En la sekvaj programoj infan-grupoj en folkloraj kostumoj montris rimarkindajn dancojn kaj prezentis popolkantojn kun granda plezuro. Iom tro frue finiĝis tiu vespero.

Teatra vespero


Tiucele la kongresanoj devis vojaĝi al la 40 km malproksima urbo Burgas. Sed la LKK estis disponiginta senkoste aŭtobusojn. Oni promenis en la centro, butikumis (multnombraj germanlingvaj libroj estis aĉeteblaj) aŭ fuĝis al kafejoj, kiam fulmotondro denove minacis. En supermoderna konstruaĵo la bulgara Esperanto-teatro ludis la komedion „La milionulo“ de Jordan Jovkov. Temis pri kurioza evento en urbo de la tridekaj jaroj. La altkvalita ludado de la aktoroj tamen ne povis ignori la iom naivan enhavon de la teatraĵo.

La spektantoj volonte aplaŭdis. Cetere oni disdonis programfoliojn.

Impresoj

Ĉiu kongresano travivis tiujn tagojn alimaniere. La impresoj estis subjektivaj. La programoj ne ĉiam havis la saman valoron. Por la interkona vespero, la balo aŭ grandstila akcepto flanke de la trafikministro oni estus dezirinta pli grandan salonegon. Ke la kongresanoj devis marŝi al tiu aŭ al alia domo, estis malavantaĝe, sed neeviteble. Aliflanke la kongresanoj povis renkontiĝi senprobleme surstrate. La organizantoj kun siaj helpantoj — ili ĉiuj meritas la sinceran, tutkoran dankon. La 36a IFEF-kongreso en Bulgario restos neforgesebla.

W.B.



Moskeo Tombul

foto: Grass

Ekskursoj

Por la du lastaj kongrestagoj en la programo estis tutaĝaj ekskursoj. LKK povis iom ekspiri, ĉar Balkanturist prizorgis ĉion memstare. Tamen necesis gvidantoj por la aŭtobusoj kaj de ilia malsama lingvotalento dependis multo. La karavano en ambaŭ matenoj startis norden, veturis preskaŭ laŭlonge de la marbordo ĝis Varna. Jaŭdon oni tie turnis okcidenten al la interna lando, kaj apud la iama ĉefurbo Pliska (681-893) ĉe la murorestaĵoj de Granda Palaco estis la unua halto. Dua sekvis post mallonga veturado apud Madara, kie sur vertikala montara rokaro videblis reliefa skulptaĵo de ĉevalrajdanto, bulgara reganto el la 8a jarcento, fama historia dokumento el la bulgar-bizanca periodo. Skizo apudvoja atentigis pri proksimaj paganaj temploj kaj palacoj el

la ŝtonkupra epoko, sed konsiderante nian malsaton kaj la horon, oni daŭrigis la veturadon al la distrikta urbo Ŝumen. Tamen antaŭ ol ekvidi manĝilon ni vizitis tie en grupoj la moskeon Tombul ĝamia, la plej malnovan kaj plej grandan en Bulgario restinta de la tempo sub osmana jugo. Post la tagmanĝo la aŭtobusoj suprenigis nin al fama arbarparko Kjoŝkovete kun giganta memormonumentaro pri „1300jara Bulgario“.

Vendredon la aŭtobuskaravano haltis en Varna unuce ĉe arkeologia kaj arthistoria muzeo kun tre interesaj eksponaĵoj, poste ĉe ruinoj de romia banejo, kie eĉ tuboj de subplanka hejtilaro estas bone konservitaj. Por tagmanĝo oni elektis la folkloran restoracion „ŝafŝtalo“ ĉe la Oraĵ Sabloj, kiun la partoprenintoj de la 20a IFEF-kongreso certe bone memoras. Post libera promenado ĉe la strando kaj poste en la urbocentro de Varna oni forlasis la urbon trans la imponan ponton Asparuŝ, de kie oni ĝuas vastan panoramon, por reveni al la Suna Bordo.

Fermo

Vendredon vespere malgranda grupo de kongresanoj kolektiĝis por solene planti „arbon de internacia amikeco“; memortabulo pridokumentas la eventon.



„Arbo de internacia amikeco“ estas plantata.

Poste pleniĝis lastfoje la kongresejo, kie LKK-estro Marinov kaj IFEF-prezidanto Giessner resumis la plej gravajn erojn de la kongreso kaj dankis al ĉiuj, kiuj kontribuis al la sukcesa plenumo de la programo. Per la solena transdono de la IFEF-flago al la venontjara LKK-estro Henning Hauge tamen ne finiĝis tiu vespero (vidu paĝon 1).

La gazetara servo, kies informoj ne ĉiam estis kompletaj kaj fidindaj sed tre bonvenaj, disdonis en la vestiblo sian kvaran bultenon. Sur la scenejo folkloraj danctropoj dum pli ol unu horo saltis, kantis, pozis, rondkiriĝis. Kun ĉarmo kaj verve la gejunuloj prezentis brile buntan programon kaj oni sentis, ke ili tion ne faris pro la mono sed pro ĝojo pri la dancarto kaj pri la okazo sin montri antaŭ internacia publiko, kiu malŝpareme fotografadis kaj aplaudis. — Restis danki, adiaŭi, disiri — ĝis venonta renkontiĝo.

Ritt

Erfolgreicher Esperanto-Kongreß in Bulgarien

Über 860 Eisenbahner aus 23 Ländern trafen sich vom 12. bis 18. Mai 1984 im bulgarischen Seebad Slănčev brjag (Sonnenstrand) zum 36. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF), der unter der Schirmherrschaft des bulgarischen Verkehrsministers Vasil Canov stand. Der Veranstaltung gingen zwei Pressekonferenzen voraus, davon eine in Sofia, die zu ausführlichen und positiven Berichten über die Ziele der internationalen Sprache und den anschließenden Esperanto-Kongreß führten. Ein Filmteam drehte einen Dokumentarfilm über alle Veranstaltungen.

Im voll besetzten Kongreßgebäude, einem sonst der Unterhaltung dienendem Rundbau, richteten die Vertreter des öffentlichen Lebens sowie der Esperanto-Organisation herzliche Begrüßungsworte an die aus ganz Europa angereisten Teilnehmer. Außer dem Verkehrsminister war u. a. auch der Generaldirektor der Bulgarischen Staatsbahnen (BDŽ) Stoil Ferdov anwesend. Der Internationale Verband der kulturflegenden Eisenbahner (FISAIC) war durch den jugoslawischen stellvertretenden Verkehrsminister vertreten. Die Landesverbände von IFEF ließen durch ihre Delegierten ihre Grüße und Wünsche ausrichten. Joachim Gießner, der Vorsitzende von IFEF und auch GEFA (Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk), erinnerte an die ereignisreiche Geschichte der seit 1909 organisierten Eisenbahner-Esperantisten, dankte ausdrücklich für die dem Kongreß durch den Verkehrsminister gewährte Unterstützung, wies auf die bedrohende Weltlage, aber auch auf die

weiterhin gültige Notwendigkeit hin, die Verständigungsschwierigkeiten durch Esperanto zu überwinden.

Die Eröffnungsfeier wurde von ausgezeichneten Beiträgen eines gemischten Chores begleitet. Eine Uniformschau zeigte die bunte Vielfalt der uniformierten Kollegen aus ganz Europa.

In einem von einem Tonfilm begleiteten Fachvortrag, dessen Verfasser Rad Sinigerov war, wurde die derzeitige Lage der Bulgarischen Staatsbahnen sowie deren geplante Fortentwicklung ausführlich dargelegt. Mehrere Arbeitssitzungen befaßten sich mit der praktischen Anwendung des Esperanto auf eisenbahnfachlichem Gebiet, insbesondere mit den nahezu abgeschlossenen Übersetzungsarbeiten für

das Fachwörterlexikon der Internationalen Union der Eisenbahnen (UIC). Einige Landesverbände informierten über Neuerungen bei ihren Bahnen.

Den Kongreßteilnehmern wurden daneben auch kulturelle, folkloristische und touristische Veranstaltungen geboten, u. a. ein Schiffsausflug nach Istanbul und Busausflüge in das Landesinnere. Nach dem Beschluß der Vollversammlung, die auch den bisherigen, international zusammengesetzten Vorstand wiederwählte, wird der 37. IFEF-Kongreß vom 17. bis 23. Mai 1985 in Vejle Dänemark stattfinden. Die deutschen Teilnehmer dankten ihren bulgarischen Kollegen für ihren Einsatz und die gastliche Aufnahme, ehe sie wieder die Heimreise, zumeist mit dem Flugzeug, antraten. W. B.

Das heutige Eisenbahntransportwesen in der V. R. Bulgarien und dessen Entwicklungsperspektiven

Auszug aus einem Vortrag von Ing. Rad SINIGEROV, Chefredakteur der Zeitschrift „Železopäten transport“, Esperanto-Übersetzung: Georgi Dolapčiev

Dieser Vortrag soll einige Fakten aus der Vergangenheit, das bisher von den Bulgarischen Staatsbahnen (BDŽ) Erreichte und die bevorstehenden, bis 1990 zu realisierenden Aufgaben, sowie Perspektiven für die weitere Entwicklung darlegen.

Die Eisenbahn war von je her Träger des wissenschaftlich-technischen Fortschritts. Die erste Eisenbahnlinie in Bulgarien wurde 1863–1866 zwischen Ruse und Varna gebaut. Durch Parlamentsbeschluß von 1885 wurden alle Bahnlinien Staatseigentum. Ende des 19. Jahrhunderts erreichte das Eisenbahnnetz eine Länge von 1550 km, 1944 waren es 3318 km und 1983 bereits 4616 km, davon 1848 km elektrifiziert (25 000 V 50 Hz), zweigleisig sind 714 km. Bei den BDŽ arbeiteten (1983) 74 200 Personen.

Anfang der sechziger Jahre begann die Einführung von Diesel- und Elektrotraktion, bereits 1979 wurde der Einsatz von Dampflok völlig eingestellt. Die Diesel-lokomotiven für die BDŽ werden in der Sowjetunion, in Rumänien, der DDR, Ungarn und Österreich gebaut, die Elloks liefert die Tschechoslowakei. 73 % aller

Eisenbahntransporte entfallen auf elektrische, 27% auf Dieseltraktion.

Der Güterwagenpark, ausschließlich in BDŽ-Fabriken hergestellt, ist zu 71% vierachsrig. Spezialwagen gibt es vor allem für Getreidebeförderung, Kesselwagen für Zement und verschiedene Flüssigkeiten, Selbstentladewagen für den Transport von Kohle und anderem Schüttgut, Flachwagen für Container u. a., insgesamt 32% des Parks. Auf dem bulgarischen Netz verkehren auch Güterwagen aus der Sowjetunion, die für Breitspur 1520 mm gebaut sind und über die Eisenbahnfährverbindung von Illitschowsk nach Varna zulaufen; dort passieren sie eine Spurwechselanlage – Details darüber unter „Aktuelles von den Bahnen verschiedener Länder“.

Nach 1966 begann in großem Stil die Automation und die Anwendung der Fernbedienungstechnik: Streckenfernsteuerung von Sofia bis Karlovo (150 km), automatischer Streckenblock von Sofia bis Plodiv (156 km). Großbaumaschinen für die Fahrwegunterhaltung wurden importiert, wodurch auf einigen Strecken eine Geschwindigkeit von 130 km/h erreicht werden konnte.

Be- und Entladevorgänge sind zu 68% mechanisiert. 1983 erbrachten die BDŽ 62% aller Güterverkehrsleistungen des Staates nach Nettotonnenkilometern und 30% der Personenkilometer. 83 Mio. t Güter und 97 Mio. Reisende wurden über durchschnittlich 218 bzw 75 km befördert. Die Einnahmen erreichten 712 Mio. Leva in 1982, die Ausgaben betragen 625 Mio. Leva.

Für die weitere Entwicklung der BDŽ sieht ein Gesamtplan fünf Schwerpunkte vor:

1. Forcierte Elektrifizierung und Ausbau der Hauptstrecken;
2. Automatisierung des Zugbetriebs;
3. Modernisierung der Rangierbahnhöfe;
4. Weitere Mechanisierung der Be- und Entladevorgänge;
5. Erneuerung des Fahrzeugparks.

Unabhängig von der Zunahme privater Beförderungsmittel wird für das Jahr 2000 prognostiziert, daß der Personenverkehr um rund 20% gegenüber 1980 zunehmen wird. Für den Güterverkehr sieht man eine Steigerung von 83 Mio. t auf 93 Mio t bis 1985 und auf 147 Mio. t bis zum Jahr 2000 vor. Beim Verhältnis zwischen den Transportmengen auf der Schiene gegenüber dem Lkw erwartet man eine Verschiebung von 56 : 42% in 1980 auf 65 : 33%. Neubaustrecken von 500 km Länge sollen gebaut werden. Um Geschwindigkeiten bis zu 160 km/h zu erreichen, werden die 49 kg m-Schienen durch schwerere ersetzt. Die durchgehende Verschweißung der Gleise wird fortgesetzt. Große Aufmerksamkeit wird man der Qualität der Unterhaltung von Containern, Güter- und Personenzugwagen widmen.


Im Rahmen internationaler Arbeitsteilung werden sich die Eisenbahnen der V.R. Bulgariens aktiv an der Verwirklichung gemeinsamer Projekte mit den übrigen europäischen Ländern beteiligen.
(Deutsche Übersetzung: G. Ritterspach)

Unsere IFEF-Kongresse in den nächsten Jahren:

37. Velje / Dänemark	1985
38. Jugoslawien	1986
39. Polen	1987
40. Frankreich	1988
41. Spanien	1989

Nachkongreßausflug

Schiffs- und busreisende Kongreßteilnehmer nahmen das Angebot eines Ausflugs nach Istanbul gerne an. Die Stadt der über 1000 Moscheen und einem orientalischen Basar verzauberte die Teilnehmer für einen ganzen Tag. Der obligatorische Ausflug in den asiatischen Teil der Stadt wurde mit einer amüsanten Schiffsreise verbunden.



Blau Moschee

foto: Grass

El la grupoj

Hannover / Bremen:

La 13an de Junio komencis nova informserio ŝako kaj ĝiaj problemoj en la kantino Bw Bremen 1, Findorffstraße 13. Enkonduko kaj problemtraktado en Esperanto..15 minutojn en ĉiu grupvespero. Taŭga ankaŭ por komencantoj.

La 19an de Majo okazis la Maja Ekspurso al Düsen.

Hamburg:

La Hamburga Esperanto-Societo festis la 10an de Majo 1984 sian 80-jaran ekziston.

Nürnberg / Lichtenfels:

11 grupanoj partoprenis la 36an IFEF-Kongreson en Bulgario. Tio estis 20% de la GEFA-anoj.

Nekrologo

La 30an de Aprilo 1984 ni perdis nian aĝan membrinon

Dora Fehmel (83).

Ŝi fariĝis GEFA-membro en 1981. Malgraŭ sia aĝo ŝi estis mense tre vigla kaj eklernis la Internacian Lingvon kaj havis daŭran kontakton kun la grupo Duisburg. Ŝi subtenis „Bona Espero“ per mondonacoj. Kolegoj Rolf Terjung kaj Manfred Retzlaff kondolencis al ŝia filino nome de la grupo Duisburg respektive de GEFA.

Rezolucio

La 36a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), okazinta en „Suna Bordo“ (Bulgario) de la 12a ĝis la 18a de Majo 1984 kun 860 partoprenantoj el 23 landoj

Substrekas, ke la kongresanoj reprezentas fervojistojn el tuta Eŭropo;

Akceptas, ke helpe de la Internacia Lingvo Esperanto, senkonsidere al ŝtataj limoj kaj malsamaj ideologioj, egalrajte kaj sen lingva diskriminacio ili traktas ne nur siajn proprajn problemojn, sed ankaŭ servas al la monda paco — precipe necesas pro la unuaj danĝeraj minacoj de per nuklea detruo de la Tero kaj ne volus, ke la homa sorto dependu de komputila butono;

Konstataj, ke ne nur multaj ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj, sed same fervojoj, fervojistaj sindikatoj kaj aliaj fervojistaj organizaĵoj praktikas lingvojn laŭ egoismaj kaj diskriminaciaj principoj kaj tiel favorigas unu kategorion da homoj uzi sian gepatran lingvon kaj devigas aliajn homojn paroli fremdan lingvon aŭ eĉ rezigni pri parolado;

Proponas al ĉiuj organizaĵoj, kiuj aranĝas kunvenojn sur internacia nivelo, enkonduki la milfoje elprovan internacian lingvon Esperanto, kiu ne nur garantias rektan komunikadon kaj lingvan egalecon, sed samtempe ŝparus grandparte — laŭ nunaj kutimoj — la bezonatajn interpretistojn, traduklaboron, tempon kaj paperon, alivorte donus nesubtakseblajn ekonomiajn avantaĝojn.

Deklaras, ke la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) kaj ĝiaj landaj asocioj estas pretaj kunlabori laŭ siaj eblecoj por atingi la menciitajn celojn kaj idealojn por la bonfarto de la tuta homaro.

Resolution

Der 36. Kongreß des internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEFF), der am „Sonenstrand“ in Bulgarien vom 12. bis 18. Mai 1984 mit 860 Teilnehmern aus 23 Ländern stattfand,

betont, daß die Teilnehmer dieses Kongresses Eisenbahner aus ganz Europa vertreten;

sie stimmen überein, daß sie mit Hilfe der internationalen Sprache Esperanto - über alle Staatsgrenzen und Unterschiede der Weltanschauungen hinweg - gleichberechtigt und ohne Sprachdiskriminierung, nicht nur ihre eigenen Probleme behandeln, sondern auch dem Weltfrieden dienen wollen, was gerade jetzt angesichts der drohenden nuklearen Zerstörung unserer Erde von besonderer Bedeutung ist, und daß sie es nicht hinnehmen wollen, daß das Schicksal der Menschheit vom Druckknopf eines Computers abhängt;

sie stellen fest: daß nicht nur zahlreiche Staaten und internationale Vereinigungen, sondern auch viele Eisenbahnen, Eisenbahner-Gewerkschaften und andere Eisenbahnvereinigungen die anzuwendende Sprache egoistisch und diskriminierend festsetzen und dadurch eine bestimmte Gruppe von Menschen, die in ihrer Muttersprache sprechen können, von vornherein begünstigen und alle anderen zwingen, sich in einer fremden Sprache auszudrücken oder ganz darauf verzichten sich zu Wort zu melden;

sie empfehlen allen Organisationen, die Zusammenkünfte auf internationaler Ebene veranstalten, sich der vielfach bewährten internationalen Sprache Esperanto zu bedienen, was nicht nur unmittelbare Verständigung und sprachliche Gleichberechtigung garantiert, sondern - gegenüber der jetzigen Praxis - auch beträchtliche Einsparungen an Übersetzungsarbeit und Dolmetschern, an Zeit und Papier ermöglichen, mit anderen Worten nicht zu unterschätzende ökonomische Vorteile bedeuten würde;

sie erklären, daß der Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten (IFEFF) und dessen Landesverbände bereit sind, nach Kräften mitzuarbeiten, um die genannten Ziele und Ideale zu erreichen, zum Wohle der ganzen Menschheit.

Joachim Schrapp 70 jarojn aĝa

La GEFA-sekretario Joachim Schrapp finas la 30an de Aŭgusto 1984 sian 70an vivojaron. 15 jarojn li donis siajn fortojn por nia germana fervojista movado. Jam en 1969, kiam necesis trovi bonvolemajn kolegojn por diversaj postenoj en la GEFA-funkciularo, li pretis fariĝi distrikta komisiito en la direkcio Münster kaj faris tiun laboron, ĝis kiam la direkcio Münster estis likvidita en 1975. Ĉar ĝuste tiam necesis trovi novan sekretarion por GEFA, li transprenis tiun oficon en la jarkunveno Treuchtlingen kaj ankoraŭ nun laboras kiel GEFA-sekretario ĝis la venonta jarkunveno, kiam li intencas demisi.



Joachim Schrapp ne estas homo, kiu ŝatas agadi en la hela lumo de la publikeco, sed modeste kaj fidine plenumas siajn taskojn sen granda bruo. 70a naskiĝtago certe estas punkto en la vivo de esperantisto, kiam decas retrorigardi kaj pesi la pasintecon, sed same iom esplori antaŭen, por palpi la estontecon. Nu, la retrorigardo kun certeco donos al Joachim Schrapp kontentan senton. Li ja estis inter tiuj membroj, kiuj volonte kontribuas al la vivo kaj funkciado de tiu Esperanto-organizo, al kiu ili iam aliĝis kun la sento, ke ili faris paŝon en la ĝustan direkton.

Kaj rilate al la antaŭen-rigardo ni ne dubas, ke li vidos antaŭ si ankoraŭ multajn allogajn aspektojn. Ni GEFA-anoj gratulas elkore pro lia 70a naskiĝtago kaj deziras al li ankoraŭ multajn jarojn en bona sanstato kune kun lia edzino Ursula. Kaj kompreneble ni esperas renkonti ilin inter ni ankoraŭ ofte, tre ofte.

Giessner · GEFA-prezidanto

Novaj prospektoj

Jen: La Federacia Respubliko Germanio. Eldonita de la Oficejo por gazetaro kaj informado de la registaro de la Federacia Respubliko Germanio, Bonn 1984. Traduko: Schwanzer Frankfurt kaj Ritterspach Mainz.

Coburg, urba bildprospekto en Esperanto. Traduko: Dr. Stammberg Coburg kaj G. Ritterspach Mainz. La stoko estas jam elĉerpita.

Augsburg, urbo kun 2000jara historio invitas. La kongresurba trafikoficejo kun LKK de la 70a UK ĝustatempe por la nunjara UK eldonis riĉe ilustritan faldfolio (25 bildoj + urbmapo). Inter la „Gravaj telefonnumeroj“ troviĝas tiuj de 4 UEA-delegitoj, imitinda ekzemplo.

Nürnberg varbas denove per Esperanto: trilingva faldfolio (angle, germane, esperantlingve) kun 10 fotoj kaj 3 mapoj malsamskalaj, kiuj utilas al aŭtomobilistoj same kiel al fervojturistoj, kun la aktuala stato de la subtera fervojo. Alloga invitilo al la duonmiliona urbo.

Unser Fernkurs ist da!

Darauf haben vor allem die Mitarbeiter im Wechseldienst schon lange gewartet: ein Kurs mit Lehrbuch, Tonbandkassette und brieflicher Betreuung. Jeder kann zu Hause Esperanto lernen, kann damit beginnen, wann er will, kann sein Lerntempo selbst bestimmen. Experten beraten individuell nach jedem Lernschritt.

So macht das Lernen Spaß!

Und der Preis: das ganze kostet nur 20,- DM. Einzahlung auf Postgirokonto 611 50-466 Postgiroamt Dortmund. Joachim Schrapp, Schmittingheide 17 d, 4400 Münster Westf. EDS-Adresse: DB-Schule 440 Münster. Stichwort „FERNKURS“ genügt.

Redaktfino por n-ro 4/84 estas la 20.8.1984